



Kulturaj Kajeroj

É MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Simpla : 5 fkoj } Sendotaj al : Micard Henri
Bonfara : 10 fkoj } Kulturaj kajeroj
Epineux-le-Seguain (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62
(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MARTO - APRILO

1966

2

KULTURAJ KAJEROJ

1966

Marto - Aprilo

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

EN HAVO

Pri Gresillon

Ĉu vi...

Esperanto tra la mondo

A. Frangeul

Budapest-evento

M. L.

Lanternoj de la mortintoj

L. Chasseraud

Olimpiaj ludoj

M.-Th. Juchault

Poeziaĵo

C.-J. Coppens

Gravaj datrevenoj

La lando de Reĝino Maud

Z. Danovskaja

Por via distro

P. Chevalier

Nia konkurso

B. Jarlier

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spégulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.
Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD

Pri Gresillon

Ĉu vi

« Ĉu vi jam aŭdis ridojn, kantojn, viglajn konversaciojn esperantajn, resonantajn en ĉiuj anguloj de granda domo ?

« Jes, en multaj lokoj.

« Ĉu vi jam gajnis multajn amikojn en kelkaj horoj ?

« Tio povas okazi.

« Ĉu vi jam vivis en tia etoso, kia ekzaltas la korojn kaj naskas amikecan atmosferon en kiu estas dolĉe baniĝi ?

« Jes, kompreneble.

« Ĉu vi okaze povis en iu momento elekti inter promenado, duondormo sur herbo aŭ sub arboj, pilkludo, banado, eĉ fiŝkaptado ?

« Jes, tio estas ebla.

« Ĉu vi havis la okazon lerni multon pri diversaj aspektoj de la internacia vivo aŭ de la vivo en aliaj landoj rekte de la enloĝantoj de tiuj landoj ?

« Jes, ĉar mi legas kaj posedas radio- kaj televido-aparatojn.

« Ĉu vi jam vekiĝis aŭdante la kanton de multaj birdoj, kiuj anoncas, ke la tago estos bela ?

« Jes, sufiĉe ofte.

« Ĉu vi matene promenis tra herbejoj kaj arbaroj ĝuante la freŝan aeron, rigardante la etajn florojn ankoraŭ kliniĝantajn sub la pezo de roso, aŭ la longaj aleojn, kies ekstremoj stompigas malantaŭ nebul-vualo ?

« Jes, kiam mi estas en la kamparo dum la ferioj.

« Ĉu vi... ?

« Sed, kial tiom da demandoj ?

« Permesu al mi fari lastan demandon : Ĉu vi jam en via vivo ĝuis ĉion samtempe : la florojn, la herbon, la naĝadon, la pilkludon, la kanton de birdoj, la amikecan etoson, la kulturiĝon en pure internacia esperantista atmosfero ?

« Mi opinias ke mi ne havis tian ŝancon.

« Tio pravas, ke vi neniam vizitis la Esperantistan Kulturdomon. Ankoraŭ ne estas tro malfrue sed.

ALIGU TUJ

ĉar memoru, ke multaj amikoj revizitas Gresillon. Dum la Paska periodo la direktoro devis peti gesamideanojn loĝi en hotelo en la apuda urbeto. Timu, ke tio okazos ankaŭ al vi.



Ne forgesu PAGI VIAN ABONON al :

Micard Henri - Kulturaj Kajeroj

Epineux-le-Séguin (May.)

C.C.P. Nantes 2349-62

La alilandanoj pagu al la supra konto aŭ al sia peranto (vidu liston sur la lasta kovril-paĝo).

Esperanto tra la Mondo



Ankoraŭ aliaj esperantaj manifestacioj en 1966 :

— Internaciaj FERIAJ Esperantaj kursoj, en Helsingör (Danlando), 17-24a de julio. Adreso : L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj (Danlando).

— 14a Internacia Esperanto-Feria Semajno, en Krommenie (Nederlando), 14-22a de aŭgusto, gastigado ĉe esperantistoj. Adreso : S-ino J.A. v.d. Meulen-v. Herten, Popelstr. 13, Krommenie.

— Internacia Junulara Kunveno, en Bamberg (Germanujo), 28a de majo-4a de junio. Temo : « Minoritataj popoloj ». Adreso : 44a Germana Esperanto-Kongreso, 86 Bamberg, Untere Sandstr. 4.

— 19a Kristana Konferenco, en Debrecen (Hungario), 23-29-a de julio. Temo : « Por la unueco de la Homaro ». Adreso : Fino T. Putto, Schaapsweg 139, Ede (Gld), Nederlando.

— Internacia Esperanto-Somerumejo, en Primošten, ĉe Adriatika Maro (Jugoslavio). Restadoj dum la tuta somero. Adreso : Internacia Esperanto-Somerumejo, Primošten, kod. Šibenika, Jugoslavio.

— Internacia Montara Esperanto-Somerumejo, Divljana, Bela Palanka, Jugoslavio. Restadoj dum la somero.

Eldonaĵoj :

— Teo Jung : La Esperanta Konjugacio.

Unua parto. Dua parto aperos en la daŭro de la venonta somero aŭ aŭtuno. Prezo por ambaŭ volumoj kune : 54 steloj (plus 10 % por sendkos-toj). Eldonis : Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

— Graĵoj en vento estas 10 jara : Per « Graĵoj en vento » 50 klasoj el 22 landoj interŝanĝas gazetojn faritajn de la infanoj mem. Adreso : 66, rue des Pins, 2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

— Jus aperis « Elementoj de geologio » en ses lingvoj (el kiuj Esperanto) fare de Sro. Gérard. Eld. SEDES, 5, place de la Sorbonne, Paris-5^e.

— Aperis en Israelo, hebrelingva lernolibro de esperanto de Dro Mašler, kun esperanta-hebrea vortareto.

— En Reĵaviko, oni eldonis islandan-esperantan vortaron.

— Aperis en Taegu, lernolibro de esperanto, en korea lingvo kaj esperanta-korea vortareto.

— En Hindujo, lernolibro por hindilingvanoj estas preparata de Sro Aŝvinikumar.

Revuoj :

— « Lingvologia revuo », esperantlingva fakeldonaĵo por lingvologio. Adreso : PO Box

764, Ingham, N. Queensland, Aŭstralio.

— « Agrikultura Bulteno ». Redaktejo : ul. Oboriste 15, Pesteria, Bulgarie.

— « Paco » monata organo de MEM. En Francio : Sano Blanc, 45 bis, rue Jeanne-d'Arc, Lyon 3.

En la radio...

— Radio-Budapest komencis la lan de februaro, elsendadi ĉiutage en esperanto. Horoj : 20.30-20.45 laŭ mezeŭropa tempo. Ondoj : 240 m 41, 6 m, 48, 1m. Adreso : Radio-Budapest, Budapest VIII, Brody Sándoru, 5-7, Hungario.

Kaj en la televido...

— La 25an de februaro, la franca nacia televido prezentis en la kadro de la emisio pri filatelo, sekvencon pri esperanto kaj pri la esperantaj poŝtmarkoj, kun intervjuo de Sro Jack Rousseau.

El germana demokrata Respubliko :

— Laŭ lastaj informoj, en G.D.R., nuntempe okazas 100 esperanto-kursoj por 1.000 personoj. Tamen, la manko da profesoroj, lernolibroj kaj prononcaj diskoj grave sentigas.

Internaciaj renkontoj okazis dum la foiro de Leipzig kaj en julio, okazos renkonto de baltmaraj esperantistoj en Rostock.

El Francujo :

— La Esperanta Grupo de Limoges organizis poresperantajn kampanjojn en 12 urboj kaj urbetoj per prelegoj, ekspozicio kaj prezentado de diapozitivaj. Sukceso en la plej multo el tiuj urboj. La grupoj dezirus koni la spertojn de gesamideanoj pri tia agado. Skribu al Sro Trement, rue Turgot, 87 Panagol.

El Belgio :

— En januaro komenciĝis esperanto kurso por Afrikaj studentoj. Gratulkartoj dezirataj : Foyer Africain, Esperanto kurso, 119, avenue Coŝghen, Bruxelles 18 (Uccle) Belgio.

Radio-amatoroj :

— Ni memorigas al vi, ke la revuo « Homo kaj Kosmo » entenas en ĉiu numero la informan kronikon de la esperantaj radio-amatoroj.

Hungara elvoko al la sportistoj por enkonduko de esperanto :

— La 30an de januaro, la ĵurnalo de la hungaraj sindikatoj « Nepszava », publikigis elvokon de hungaraj ĉampionoj, sportaj gvidantoj kaj ĵurnalistoj al la olimpiada Komitato kaj la sportistoj de ĉiuj landoj, por enkonduko de la internacia lingvo en la sportaj diverslandaj renkontoj.

Evento de la 51-a U. K.

BUDAPEST

La tutmonda esperantistaro jam amasiĝis antaŭ 36 jaroj en la hungara ĉefurbo : la vasta, brila koncerthalo de la apud-rivera Duna Reduto fajris de entuziasmo, kiam 1200 kongresanoj solenis la malfermon de la 21a U.K., de verdstela paca renkonto. Paca, jes, laŭ volo kaj deziro de la partoprenantoj, je sojlo de l'epoko faŝisma, militema, Aŭgusto 1929! La hungara esperanto-movado enspiris liberan spiriton, naskiĝis grandaj esperoj, sed, ...nur eta tempo pasis kaj fulme trakuris la terglobo la memorinde terura, ekonomia krizo, disskuante multloke ankaŭ nian movadon.

Kaj tiam evidentiĝis, kiel grave fortigis tiu Kongreso la esperanto-movadon en Hungario. La hungaraj esperantistoj levis malgraŭ ĉiuj obstakloj pli alten la standardon de la esperanta kulturo. Ekestis glora epoko de nia kulturo, prezentis sin vico de novaj, modernaj verkistoj kaj poetoj esperantaj. La revuo « Literatura mondo » fariĝis

subgvide de hungaraj esperantistaj poetoj K. Kalocsay kaj J. Baghy, fokuso por freŝaj talentoj. La Universala Kongreso rezultigis tiun tempon, kiam seren-mienaj hungaraj esperanto-profesoroj fervore klarigis la 16 regulojn de Lingvo Internacia, norde kaj sude, okcidente kaj oriente, en urboj kaj vilaĝoj de la lando, por novaj aroj de adeptoj.


Post triono de jarcento denove en Budapeŝt amasiĝas la esperantistoj, sed ili tute aliajn cirkonstancojn trovas. Kiom turniĝis la rado de historio mondscale kaj enlande! En Hungario — iama lando de tri milionoj da mizeruloj — nuntempe nenie ekzistas la iama mizero. Hodiaŭ jam libere spiras la hungara popolo, la ĉiutagaj homoj, inter ili ankaŭ la esperantistoj.

La esperanto-movado nuntempe jam ĝuas fortan apogon ĉiurilatan. En pacama atmosfero ĝin helpas fervore la registaro, sindikatoj, uzinoj kaj kulturpalacoj. Krome



Budapeŝt : Parlamentejo.

BUDAPEŬT. — Vidaĵo sur la Reĝa Fortikaĵo :
Statuo de reĝo Sankta Stefano
Fiŝkaptista bastiono.



meritas mencion la apogo de la hungara preso : gazeto, revuo ĉiutaga, ĝenerala kaj faka, kiuj iom post iom ĉiam pli da artikoloj aperigas pri la Lingvo Internacia kaj pri ĝia kongreso. Kaj nun la invito de 51a U.K. pere de la hungara registaro laŭ propono de Hungara Esperanto-Asocio, estas klara argumento al ĉiufanka apogo de nia afero.

Bone karakterizas la staton de la esperanto-movado en Hungario, interalie la tri Esperant-gazetoj : « Hungara Esperantisto » pri movadaj informoj, « Hungara Vivo » socia, kultura informo pri nia lando, « Hungara Fervojista Movado » kun sia tre varia enhavo en bonega lingvo. Ĉiutaga 15 minuta-disaŭdigo esperantlingva en la hungara Radio. Krome la membraro de la Asocio en konstanta ritmo pliiĝas. Ankaŭ sur kampo de lerneja instruado de Esperanto aperas ĉiam novaj rezultatoj ; eĉ ankaŭ inter la pedagogoj estas bonvenita la ideo de Lingvo Internacia. Tiun laboron helpas la ŝtata eldonejo per aperigo de esperanto-lernlibroj. Menciinde, ke la hungara, en Mez-Europo, estas en lingva izoliteco kaj tiu situacio direktas la atenton, interesiĝon de la publikaro al Esperanto. Tamen la realigo de la eblecoj dependas de vigleco de la esperantistoj.

51a Universala Kongreso de Esperanto inter 30 julio-6 aŭgusto 1956. Ĝian programon certigas parte la kutimaj oficialaj eventoj pere de Universala Esperanto-Asocio kaj de diversaj fakaj asocioj, parte kulturaj, artaj kaj distraj aranĝoj.

Por malferma kaj ferma solenaĵo servas la granda Sporthalo (Sportsarnok), kiu ebligas la partoprenadon de plurmiloj da kongresanoj. La bela Kulturpalaco de Konstruista Sindikato (Mémosz), apud la Urboarbo (Varosliget), garantias la samlokan Kongresejon. Laŭ la projekto ĉi tie okazos la Ĝenerala Komitato —, kaj Labor-kunsidoj, ĉefe la Estrar-kunsidoj de U.E.A., krome la sidado de l'Esperanto-Akademio. Krome tie-ĉi havos lokon la Internacia Somera Universitato kaj la Konkuroj por Belarto, Oratoro kaj Foto. Samloke okazos la kunvenoj de la diversaj fakasocioj, scienculoj, juristoj, pedagogoj, fervojistoj, na-

turamikoj, ktp.

Grandiozan programon promesas la Arta Festivalo. En ĝia programo okazos : Hungara Vespero, debuto de hungara popolarto, la prezentadoj de l'Internacia Arta Teatro, Bulgara Esperanto-Teatro, Pola Esperanto-Teatro, Hungara Marioneto, Literatura Programo de Hungaraj Verkistoj, Programo de la Esperantistaj Verkistoj-Poetoj.

L.K.K. prizorgas ankaŭ distriĝon de la kongresanaro : balo en aŭlo de l'Ekonomicienca Universitato ; bankedo en Somera Restoracio Gundel en Urboarbo ; ekskursoj laŭplaĉe :

al 1) Miskolc-Aggtelek-Lillafűred en Nord-Hungario, 2) Kecskemét-Solt-Dunaujváros sur Granda Ebenajo, 3) Esztergom-Dunakanyar, historia urbo en pitoreska kurbiĝo de rivero Danubo, 4) Balaton-almádi, strandbanejo ĉe lago Balaton, « Hungara Maro ».

Samdate okazos la aranĝo de Ila Infana Kongreseto en arbaro Budai hegyek. Laŭ la decido en Budapeŝto okazos la 36a Kongreso de la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj.

Laŭtradicie okazos la Antaŭkongreso. Ĝi estos aranĝata 27-30 jul. en universitata urbo Debrecen en Orient-Hungario sur Granda Ebenajo. Krom la oficialaĵoj la partoprenintojn distros balo kaj ekskurso al stepo Hortobágy.

Same al la tradicioj estos aranĝata la Postkongreso. Ĝia okazejo inter 7-9 aŭg. en universitata « urbo de sunbrilo » Szeged en Sud-Hungario. Ĉi-tie luksa programo atendas la partoprenantojn : urbovizito, ŝipekskurso, koncerto de orgeno, liberaera prezentado teatra, balo, folkloro programo.

L.K.K. invitas kaj la hungaraj esperantadeptojn de Esperanto, Lingvo Internacia ĉi-tistoj atendas kun tradicia gastamo la jare en Hungario.

M. L.

LANTERNOJ DE LA

MORTINTOJ

La turistoj kaj precipe la eksterlandaj vojaĝantoj, kiuj vizitas Francujon, kelkfoje miras, vidante strangajn ŝtonajn konstruaĵojn, plej foje turformajn, kies signifon ili ne scias, ĉar ili neniam renkontis tiajn turetojn en siaj propraj landoj. Se ili atente rigardas, ili tuj ekvidas, ke la supra parto de la konstruaĵo estas borita per truoj aŭ vertikalaj fendoj, kies celo estas ebligi al la preterpasantoj la vidon de interna lumo.

Fakte, en la pasinta tempo, dum pluraj jarcentoj, lumo daŭre aŭ almenaŭ ĉiunokte brilis en tiuj malgrandaj turoj, kiuj staris en la tombejoj, pro kio oni nomas ilin « Lanternoj de la Mortintoj » (franclingve : *Lanternes des Morts*).


Se oni pli zorge kaj detale observas tiujn konstruaĵojn, oni konstatas, ke iliaj formoj estas tre diversaj. La plej grandaj kaj belaj — ekzemple : tiu de FENIOUX, en la departemento Charente-Maritime — aspektas kiel eleganta fasko da kolonoj, kiuj ĉirkaŭas internan helikan ŝtuparon, per kiu la deŝoranto suprenigis la lampon ĝis la supra parto de la turo. En aliaj malpli dikaj turoj, rondaj, kvadrataj, kelkfoje ses- aŭ okangulaj, ne estas interna ŝtuparo, sed nur malsupra aperturo, tra kiu oni povis enigi kaj suprenigi la olean lampon en la traborita kolono ĝis la supro, pere de ŝnuro kaj pulio.

Plej ofte malgranda kruco surstaras la turon ; kelkfoje, ŝtono flankas la malsupran parton de la konstruaĵo, por la diservo. Sur unu el la Lanternoj — tiu de MOUSSAC, en la departemento Vienne — ne estas kruco, sed ŝtona globo.

Tiaj konstruaĵoj estas tipe francaj. Preskaŭ nur en Francujo oni povas vidi ilin en urboj kaj vilaĝoj. Sed nur malmultaj ankoraŭ staras, ofte ekster la tombejoj, ĉar la tempo, la militoj kaj revolucioj detruis multajn ; kaj precipe kiam, higiecele, oni translokiis ekster la loĝlokojn la tombejojn — kiuj antaŭe kuŝis ĉirkaŭ la preĝejo meze de la urboj aŭ vilaĝoj — oni detruis la « lanternojn de la mortintoj ». Tamen oni iafaje lasis ilin sur la lokoj, kies ili staris ; tial ni povas nun vidi kelkajn, kiel ornamaĵojn, en urbaj ĝardenoj aŭ sur vilaĝaj placoj, kiuj anstataŭis la estintajn tombejojn.

Proksimume nur kvardek « lanternoj de la mortintoj » ankoraŭ staras en Francujo. Preskaŭ ĉiujn oni konstruis dum la XII-a jarcento, laŭ la romanika konstruaro ; tiu de SAINT-PIERRE-D'OLERON — (« Sankta Peto » sur la insulo « Oleron ») — konstruita dum la XIII-a jarcento, estas bela gotika turo.


Ekser Francujo nur malmultaj tiaj « lanternoj »



estas videblaj. Oni povas trovi unu en Italujo (Toskanujo), kelkajn en Aŭstrujo (Tirolo, Bohemujo) kaj unu en Sirio, en la tombejo de SAINT-JEAN-D'ACRE — (« Sankta-Johano-de-Akro ») — kie ĝin konstruis la

francaj krucistoj, verŝajne je la komenco de la XIII-a jarcento. Sed ŝajnas al la historiistoj kaj arkeologoj, ke la deveno de la « Lanternoj de la Mortintoj » estas franca, ne nur ĉar la plej multaj staras en Francujo, sed ankaŭ tial, ke en la aliaj landoj oni konstruis ilin dum la XIV-a, XV-a, eĉ XVI-a jarcentoj, do multe pli malfrue ol en Francujo. Pro tio ni povas opini, ke en aliaj landoj oni nur kopiis la francan kutimon starigi tiajn lumturojn en la tombejoj.

Ne en ĉiuj regionoj de Francujo konstruiĝis la « Lanternoj de la Mortintoj », sed en la centra kaj okcidenta partoj de la lando. Nur tri el ili troviĝas en aliaj francaj regionoj : du en Normandio, unu en Provenco, ... kaj oni ne estas certa, ke tiuj tri konstruaĵoj estas veraj « lanternoj ». Tia fakto multe pri-



pensis la arkeologojn, kiuj proponis plurajn klarigajn hipotezojn. Ĉar oni trovas tiajn malgrandajn lumturojn precipe en la lokoj, kie staris benediktaj abatejoj, — same en aliaj landoj, kiel en Francujo — multaj kleruloj nun opinias, ke ni ŝildas la « Lan-

ternojn de la Mortintoj » al la Benediktanoj, en kies ĉefa abatejo (Abatejo de Cluny) vere naskiĝis la kulto por la mortintoj, kun specialaj ceremonioj la 2-an de novembro ĉiujare.

Estas klare, ke la ĉefa celo de tiuj malgrandaj lumturoj estis omaĝi al la mortintoj. Ĉie, ĉiam, en ĉiuj religioj, oni honoris la mortintojn, lumigante lampojn, kandelojn aŭ flamon jen sur la doma altaro en la antikva Romo, jen sur la tombejoj de kelkaj regionoj kaj landoj dum la nokto de la 1-a ĝis la 2-a de novembro, jen apud la kadavro aŭ la ĉerko antaŭ la entombigo, jen, nuntempe, sur la tombo de la « Nekonata Soldato » en diversaj landoj. Ankaŭ la « Lanternoj de la Mortintoj » estis honormonumentoj al la forpasintaj homoj. Krome, ili staris en la tombejoj por rememorigi al la vivantaj preterpasantoj, ke la mortintoj nun estas lumigitaj de la heleco de la Kredo, kaj precipe ke la vivantoj devas memori pri la mortintoj kaj preĝi por ili.

Kvankam oni ne precize scias, kiu aŭ kiuj pagis la oleon por la daŭra lumigo de la lampoj, oni tamen scias, ke en kelkaj urboj estis specialaj tiucelaj donacoj, en aliaj urboj kaj vilaĝoj estis devigaj kaj laŭvicaj donacoj de oleo, fare de la diversaj familioj de ĉiuj vilaĝetoj. En kelkaj lokoj, la pastroj faris specialajn monlektojn por povi aĉeti la bezonatan oleon, por ke senĉese brilu lumo en la supro de la monumento.

Nuntempe, oni ne plu eklumigas lampon en la supro de la « Lanternoj de la Mortintoj ». Tamen daŭras la pia kutimo omaĝi al la mortintoj per lumo aŭ flamo : kelkfoje oni konstruas novajn specialajn lumturojn, kiel oni faris super la « Ostarejo de Douaumont », en Francujo, por honori la soldatojn, kiuj mortis apud Verdun dum la unua mondmilito ; aŭ oni kopias malnovan romanikan « lanternon » — ekzemple sur la tombo de la verkisto Maurice Barrès — ; kelkfoje oni ĉiuvespere rebruligas senĉesan flamon : tiel estas en Parizo sub la Triumfarko super la tombo de la Nekonata Soldato de la mondmilito 1914-1918.

Verŝajne ĉiam la homoj omaĝas al la mortintoj per iom aŭ multe da lumo, simbolo de eterneco.

Louis CHASSERIAUD.

La Olimpiaj Ludoj

dum la Antikva Tempo

Revivigante la Olimpiajn Ludojn, en 1893, Pierre de Coubertin renovigis la ĉesnan interesigon pri la sportaj performancoj, speciale gravan en la antikva greka civilizacio en kiu la sporta edukado estis ege kunligita kun la intelekta. Olimpio, kiel Romo aŭ Tokio, ĉiun kvaran jaron allogis homamasojn venantajn el ĉiuj partoj de la greka, kaj eĉ de la « barbara » mondo ; ĝi fariĝis unu el la plej gravaj centroj de la helena civilizacio, ne nur pri la sportaj areoj, sed ankaŭ pri tio, en kio la sportaj konkursoj reflektis.

Laŭ la mitologiaj legendoj, Oinomaos, reĝo de Olimpio, timis, ke lia filino, Hippodamia, edziniĝos : orakolo estis al li aŭgurinta, ke tiu edziniĝo kaŭzos lian morton. Tial li elmetis la svatulojn al ĉarkurado, post kiu ĉiuj mortis. Sed oriendevena svatulo, le heroo Pelops, tiel subaĉetis la servistojn de Oinomaos, ke radakso de ties ĉaro detruigis ; la reĝo mortis kaj Pelops edziĝis al Hippodamia.

Do ĉiamaŭ la ĉarkuradoj ŝajnas fonditaj de la reĝo de Olimpio rilate kun orakolo, t.e. kun religio. Je la sama vidpunkto meze de la konsekrita areo nomita « altis », oni supozas, ke troviĝis templo al Pelops dediĉita ; verŝajne la ludoj parte memorigas tiun heroon, ilian fondinton. Kaj duan fondadon de ili oni atribuis al Heraklo, doria « heroo », t. e. duondio, simbolulo de la fizika forto grandanime uzata por helpi la homojn.

Laŭ la tradicio, la unuaj Olimpiaj Ludoj okazis en la jaro 776 a.k. komenciĝdato de la unua « olimpiado » aŭ ciklo da kvar jaroj. Fakte tio verŝajne estas la dato ne de ilia fondado, sed de ilia definitiva reguligo.

Nuntempe oni konsideras ilin laŭ tri vidpunktoj ĉiuj religiaj : eble ili estas importatoj el Kreto, kie la sportaj ekzercoj montriĝis tre ofte praktikitaj, laŭ la multaj freskoj trovitaj en Knossos kaj aliloke ; aŭ ili devenas de tiaj funebraj ludoj, kiaj estas priskribitaj en la Iliado, okazze de la enterigo de Patroklo ; en tiu okazo ili povus celi de tempo al tempo reanimi la mortintojn ; aŭ fine, ili povas esti priagra rito, celanta skui la teron kaj la subterajn diojn en ĝi loĝantajn por ke ili donu bonan rikolton.

La Ludoj do havas malprecizan devenon sed ĉiukaze tre antikvan eble importitan, eble nur rilatan al la Tero, duobla potenco kiu kunkune tenas la mortintojn kaj naskas ĉiun vivantan.

Olimpio situas en la eksa provinco Elido, en la nordokcidenta parto de Peloponezo, la « duoninsulo de Pelops ». Ĝia malproksimeco de la granda urbo eble difaciligis ĝian « panhelenigon ». La loko estas ĉirkaŭata de koniferplantitaj montetoj, do ombrata

kaj malvarmeta, kompare kun aliaj regionoj de Grekujo. Oni tie distingas religian aron konsistantan el pluraj temploj, dediĉitaj al Zeus, Hera, Pelops, kaj aliaj malpli gravaj konstruaĵoj ; sed pri la sanktejo ni ne parolos ; kaj la sportan aron, kies elementoj : la palestro, la stadiono, la hipodromo, situas ekstere de la « altis », ĉirkaŭmuro de la sanktejo.


Precipe la stadiono kaj la palestro estas bone konservitaj. La stadiono estas 192,2 metrojn longa ; laŭ la legendo, Heraklo ĝin difinis metante 600 fojojn siajn piedojn unu antaŭ la alian. Ĝia longo determinis tiun de ĉiuj aliaj stadionoj, kaj de la lungunuo nomita « stadio ». Ĝia sidŝtuparo povis enhavi 40.000 spektantojn. De la palestro, ekzerĉejo por la luktonoj, oni trovis plurajn ĉambrojn, kies enirejoj ofte estis ornamitaj per kolonoj.

La ludoj okazis ĉiun kvaran jaron dum la fino de junio kaj la komenco de julio. Unu monaton antaŭe la konkursoj surloke ekzerĉiĝis ; por partopreni la ludojn ili devis esti grekaj, liberaj civitanoj, neniam kondamnitaj kaj sufiĉe riĉaj por pagi la elspezojn pri la ekzerĉejo. Konsekrita militpaŭzo per-



mesis al la « Barbaroj » same kiel al la Grekoj, ekiri al Olimpio, kie organiziĝis speco de festivalo kun konferencoj kaj ankaŭ foirifestoj. Oni dormis ekstere dum la sep tagoj, kiujn daŭris la Ludoj.

La unuan tagon okazis religia ceremonio, kun proceso kaj oferoj al Zeus, dia patrono de la sanktejo. La kvin sekvantaj tagoj estis okupataj de la sportaj provoj, trispecaj : la kuradoj : simpla (unu aŭ du stadion-longojn), longa (dekdu stadion-ĉirkaŭojn), kun armiloj kasko kaj ŝildo, kun ĉevaloj kaj ĉaroj (sur la hipodromo) ; la luktoj kun la manoj nudaj kaj la korpo oleita, kiel en la nunaj turkaj luktoj (la venkito estis tiu, kiu tri fojojn tuŝis la teron per sia ŝultro, pugnobatalo kun la pugnoj garnitaj per ledrimenoj plifortigitaj per plumbajoj ; la pankraco, kiu kombinis la lukton kaj la pugnobatalon : la « peritato » kuniganta kvin provojn : simplan kuron, salton, lukton, ŝetadon de disko kaj de jetlano.



La lastan tagon, la Helanodikoj, kiuj prezidis la ludojn, oferis grandan festenon ; la venkintoj ricevis laŭrkronon, versajne simbolantan, ke simpatias ilian venkon la fortoj de la Tero, kiujn la provo eble elvokis. Kiam ili revenis en sian civiton, oni ilin entuziasme akceptis kaj kelkfoje starigis statuon de ili. Ili ĝuis grandegan prestiĝon, oni admiris en ili la tipajn kvalitojn de la dorianoj, invadintoj de la Peloponezo, tiujn de la Spartanoj, precipe iun individuan energion, cetere kunligitan kun aristokrata ideologio. La civitestraro mendis al poetoj, kiaj Pindaro, verkaĵojn por glori la venkintojn. Ankaŭ al la vazpentristoj tio provizis tre diskonatan temon.

Nur poste, dum la kvara jarcento a. k. la atletoj, fariinte profesiuloj, praktikis la sporton kun pli profitemaj celoj, kaj ilia prestiĝo dekadencis. Finfine, trans la partigoj kiuj kontraŭmetis la civitojn, Olimpio pli kaj pli fariĝis kunvencentro por ĉiuj Grekoj, eĉ por alilandanoj kaj tiel kontribuis almenaŭ provizore al la restarigo de neŭtraleco inter la malamikoj. Nuntempe, ĉiun kvaran jaron flamo estas ekbruligata en la stadio de Olimpio; jam en ilia tiama « panheleneco » ĝermis la nuna internacieco de la Ludoj.

M. Th. JUCHAULT.

Poeziaĵo verkita de Sinjoro C.J. COPPENS, dum la lasta tago de lia somera restado en la kastelo Grésillon :

ADIAŬ

Kial estas mi malĝoja ?
Kial ploras la ĉiel' ?
Morgaŭ estos mi survojo,
Iros mi al nova cel'.

Morgaŭ multaj jam forestos
El gastama la kastel'
Kaj nur kelkaj, kiuj restos !
Tial ploras la ĉiel'.

Dum semajnoj ni kunestis
Kiel granda amikar',
Morgaŭ ĉiuj ni disiros
Per la trajn' aŭ trans la mar'.

Al prelegoj ni aŭskultis,
Ni rigardis al ekran',
Estis saĝaj ni kaj stultis
En diskut' sen iu plan'.

Partoprenis ni ekskursojn
Kaj manĝadis sub la ter',
Aĝlojn vidis ni kaj ursojn,
Saniĝigadis la veter'.

Konatiĝis ni kun multaj,
Amikiĝis ni kun malpli,
Forgesiĝis la plej multaj,
Kelkajn rememoros mi.

Ĉu denove mi ĉi tien
Iam venos en estont',
Aŭ ĉu iros mi alien ?
Granda estas ja la mond' !


Pri ĉi tiuj belaj tagoj
Certe restos la memor'
Kaj pri la komunaj agoj
Io restas en la kor'.

Adiaŭos ni por ĉiam ?
Plene mankas ja la sci'.
Ĉu mi renekontos iam
Tamen kelkajn inter vi ?

Morgaŭ estos mi survoje,
Iros mi al nova cel',
Tial kantas mi malĝoje,
Tial ploras la ĉiel'.

C.J. COPPENS.

GRAVAJ



DATREVENOJ

Antaŭ 350 jaroj mortis en Stratford on Avon :
WILLIAM SHAKESPEARE. — Tipa reprezentanto de la angla Renesanco, William Shakespeare estis aktoro, dramverkisto kaj kunposedanto de la Globe Théâtre en Londono. Liaj verkoj staras ĉe la supro de la okcidenta dramaturgio. Ĝi entenas ne nur komediojn sed ankaŭ tragediojn, mirtetraĵoj.



Antaŭ 65 jaroj naskiĝis en Augsburg :

WERNER EGK. — Tiu bavara komponisto klopdis dum sia tuta vivo renovigi la operon konforme al nia epoko. Krom diversaj operoj (« La Ensorĉita Violono », « Peer Gynt »), kies tekstojn li ankaŭ skribis, li komponis efikoplenan balet-muzikon (Abraxas).



Antaŭ 50 jaroj mortis en Leipzig :

MAX REGER. — La komponaĵoj de Max Reger situas inter malfrua romantismo kaj moderna muziko. Lia vasta verko, kantoj, komponaĵoj por organo kaj orkestro, ĉambromuziko, estas influita de la polifonio de la baroka epoko de Bach.

La lando de regino Maud (I)

Novelo de Jorja Danovskaja

Verŝajne, ŝi estis bela, la reĝino, se tutan landon oni baptis laŭ ŝia nomo. Kial ŝi ne estu bela? Ne ĉiuj ja reĝinoj estis tiom hidaj, kiel Elizabeto I.

Maud, verŝajne, estis alta kun blondaj haroj kaj bluaj okuloj: tiom bluaj, tiom profundaj, ke, se longe rigardi ilin, oni povis vidi propran koron. Verŝajne, ŝi havis sveltan talion kaj varmajn lipojn, kvazaŭ matena suno. Verŝajne, laŭte susuris ŝiaj pompaj jupoj, broditaj per arĝento, kiam ŝi malsupreniris en gardenon laŭ malvarmaj ŝtupoj de sia palaco. Tie malsupre atendis ŝin la aŭdaca maristo. Li estis alta, nebela, kun malhela vente brunigita haŭto, kun grandaj manoj, maldelikataj per peza marista vivo, salitaj per ĉiuoceanaj ventoj. Ĉirkaŭ lia kolo estis ligita silka tuko kun broditaj rozoj kaj ora monogramo.

Li rigardis en la okulojn de sia suvereno, kaj lia koro laŭte batis ie sub la gorĝo mem.

Kaj poste ree tremis la veloj sub vento, simile al flugiloj de gigantaj mevoj; la ŝipprandojn furioze frapis la verdaj ondoj; bruis uragano, rompante ŝipojn, kvazaŭ nuksoŝelojn. En la arda aero susuris palmoj per rigidaj folioj. Sunbrunigitaj indiĝenoj disbatis kokosnuksojn, kaj seka arda aero de dezerto — garmatano — pelis flockojn de ruĝa polvo laŭlonge de Gvineo bordo, kaj la sablo nube ŝvebis en horizonto.

Kaj poste denove iĝis malvarme. Ĉiele arĝentaj nuboj memorigis ion dolore konatan, senfine karan. Sed la vento ŝiris la velojn, kaj la ŝipo iris suden. Malproksime postrestis landoj de la indiĝenoj, la brulanta suda ĉielo. La horizonto estis tegata de blanka vualo. Kaj fine la deĵoranta vaĉano,

kiu sidis supre en tradicia barelo, ekkriis: « Tero! ». La aŭdaca maristo, sufokiĝante pro feliĉo, pensis: « Mi donos al la lando nomon de mia reĝino. Eterne konservos la memoron pri ŝiaj bluaj okuloj la malvarmaj rokoj, kovritaj de neĝo. »

Laŭ la moro de ĉiuj vojaĝuloj oni surterigis botelon kun skribaĵo, metis ĉirkaŭ ŝtonojn, trinkis vinon el netuŝeblaj provizoj kaj ekskursis laŭ la returna vojo.

La maro kolere renkontis kuraĝajn navigantojn, ondoj transruliĝis la ferdekon. Kvazaŭ indignitaj dioj, ĉirkaŭe leviĝis blankaj abruptoj. La ŝipo estis portata malantaŭen al la glacioj de Antarktido. Ĉe ĝiaj bordoj embuskis la ŝtormo, kaj la skuita ŝipo kun vunditaj flankoj en multaj lokoj kaj flikajoj estis ĉetata kontraŭ ŝtonoj.

Kaj neniu homo revenis hejmen, neniu rakontis pri la malproksima ŝipiro.

En skvalo de popolaj ribeloj estis pereanta la ĉarma reĝino. La reĝinon oni ne kompatis. Ŝi estis subpremanto. Kiom valoras ŝia bonkoro? Ŝia popolo vivis same malbone: kiel en aliaj reĝlandoj. Sed oni kompatis la virinon kun granda amo en la animo, belegan, kiel fabela floro de Afrikaj oazoj — lotoso, kiu havis malfeliĉon naskiĝi reĝino. « Ah! Kial mi ne naskiĝis simpla kudristino! » — verŝajne, pensis ŝi en sia lasta horo. Kaj tiam ŝi rememoris, eble, brunan, venteharditan vizaĝon kaj ardaĵn tenebrajn manojn kun kruda haŭto.

Kaj en glaciaj vastoj de l'Antarktiko por eterne restis la lando, portanta ŝian nomon. Hurlis la ventoj, tintis neĝoblovadoj neeltenebla malvarmo descendis de la senindulga griza ĉielo. Kaj, verŝajne, al homo, kiu post

multaj jaroj surpasis la landon, ŝajnis almenaŭ strange, ke glacia malvarmo ne degelis pro flamo de l'koro, kiu portis sian senfinan amon tra la tuta planedo kaj senmortigis sian amatan.

... Nomu novan kontinenton per mia nomo. Donacu al mi peceton de la mondo. Donacu al mi almenaŭ etan insulon. Eĉ ĝi estu ne insulo, nur roko en Pacifiko !

Kial ŝi naskiĝis tiel malfrue ? En la XX^a jarcento ne restis blankaj makuloj sur la mapo. Longen kaj krucen estas esploritaj ĉiuj kontinentoj, malkovritaj ĉiuj insuloj. Ĉiuj rokoj, ĉiuj subakvaj rifoj estas metitaj sur la mapon. Sed Andreo ridas kaj diras ke ŝi estas stranga, ke ĉio ĉi estas — infanaĵa. Kial do li ne komprenas ! Ŝi ja ne bezonas tiun teron en malvarma antarktiko. Ne. Ŝi bezonas nur la koron. Ĝi estu granda-granda. Kaj ĝi batu same forte, same subtile, same fidele.

... Ili ne ekamis unu la alian ĉe l'unua rigardo. Tio venis nerimarkite. Ili kune kreskis, kune lernis en la lernejo. Sur la sama benko kun ŝi Andreo ne volas sidi ; por neniu trezoroj. Ili sidis en diversaj anguloj de la klaso, sed iris en la lernejon kune. Kune ili ludis. Oni ilin moknomis gefanĉoj. En ilia korto knabinoj amikis kun knaboj, kaj dum maloftaj neĝaj tagoj oni ludis militon kontraŭ la knaboj el najbara korto, la knabinoj preparis neĝbulojn. Unu tagon Andreo trafis en malamikan ringon. Retiriĝante kun pafoj, li atingis sian pordon, sed la malamikoj persekutis lin laŭspure. Kaj Zin-

jo, malviva pro timo, ĵetis pezan glacieron en la lampon subplanke. Aŭdiĝis surdiga tondro, tintante laŭte, falis pluvo da splitoj, kaj poste subite iĝis silento kaj mallumo. Andreo sukcesis malaperi.

Kelkiam ili kune preparis hejman taskon. Zinjo faris ĉion rapideme kaj malakurate, facile solvis komplikajn matematikaĵojn, mokante malrapideman Andreon. Kaj li ŝatis ĉion fari solide kaj fundamente, en liaj kajeroj, plenigitaj per rektaj linioj de lia ronda skribmaniero, mankis forstrekaĵoj, kaj paŭzoj. Fininte la taskojn, ili grimpis sur la grandan kanapon ĉe la fenestro kaj malfermis la antikvan geografian atlason. Ili vojaĝis pasie kaj ravite. Trankvila malrapidema Andreo flamiĝis. Ili konstruis eksterordinarajn ŝipojn, subakvajn boatojn, piede krucis meridianojn kaj paralelojn. Ĉiuj romanoj de Jules Verne, Jack London, Kaverin, Kazancev interplektiĝis en iliaj revoj. Kaj jen foje, navigante al la Suda Poluso ili malkovris la Landon de reĝino Maud. Tiel naskiĝis la fabelo.

La amo enradikiĝis en ili nerimarkite. Ili tiam jam finis la lernejon kaj intervidiĝis malofte. Zinjo lernis en la kurso de medicinaj flegistinoj ; Andreo foriris navigacian lernejon. Ili renkontiĝis ĉe la parka heĝo vespere antaŭ la Nova Jaro. Iĝis klare, ke ili bezonis la renkonton, ke ĉiu el ili sentas mankon de la alia. Ili ne iris al novjara festeno, sed la tutan varman Nigramaran novjaran nokton promenis en la urbo. Ili ion diris, sed ne rememorus, kion. Kaj tio eĉ ne gravis.

(Daŭrigota).



POR VIA DISTRO

Unua problemo. — (20 poentoj)

En la ĉisuba teksto, bonvolu anstataŭgi la punktojn per la taŭgaj vortoj. Estas kalkulitaj po 2 poentoj por ĉiu vorto ĝuste trovita, sed estas forprenita po 1 poento por ĉiu erara vorto.

Pluan fojon, la nokto en mian koron, ... sur miajn rememorojn. Ĉiuj kanaloj, en la Okcidento, estas plenaj lakto kaj mielo. Mi ne scias maldoda kaj malluma likvoro enestas, male, en tiuj de l'Oriento. Mi enpensigas, senmove, ... la limo de la ombro kaj de l'ĥelajoj. Same la vojaĝemaj anĝeloj, mi mian mision. Venis la horo revojaĝi al mia patrujo.

Mi ankoraŭ rigardu vin, ĉielosata akvo, spuglo de la maltrankvilo, malĝoja kristalajo, tute opalsimila ĉe la tagiĝo kaj pli malluma, vespere, ... gagatornamajo.

Malsupre, en la fendo de la poldero, barko plata, kripla, glue sur la sunsubirejo, inter du karbaj nuboj. Maljuna boatisto, kun hokostango sur la, marŝas laŭlonge de la bordo.

Dua problemo. — Litera enigmo (10 poentoj)

1 vetero	9 vindi	17 brusto
2 kaliko	10 graso	18 poeto
3 terni	11 boato	19 korno
4 biĉeto	12 breto	20 pastro
5 sango	13 saluti	21 palaco
6 karato	14 lunĉo	22 turno
7 blato	15 barako	23 pugno
8 kareso	16 gusto	24 ofendi

Elprenu el ĉiu supra vorto unu literon tiel, ke la restintaj literoj, lasitaj en siaj antaŭaj lokoj, formu novan vorton. La elprenitaj 24 literoj en la numerita vico prezentos interesan polan proverbon.

Remarko :

Ĉar tiuj du problemoj estas la lastaj de nia konkurso 1965-1966, mi petas, ke ĉiuj konkursantoj bonvolu respondi al tri pliaj demandoj; tiujn respondojn oni kalkulos nur por dispartigi la eventualajn ekvalajnintojn.

1) Pri kiu lando temas la teksto de la unua problemo?

2) Kiu estas la aŭtoro (origina) de tiu teksto?

3) Kiu tradukis la tekston esperanten?

Bonan kuraĝon, kaj sendu viajn respondojn antaŭ la 31a de Majo, al :

Sro P. CHEVALIER

19, Bd Gabriel-Lauriol

44 - Nantes (Francujo)

AMUZAJ PROBLEMOJ

Solve de la lastaj problemoj

La cirklo, kiu havas du centrojn :

CMD = 90°; do CD estas diametro.

CNE = 90°; do CE estas diametro.

Ĉar estas du diametroj CD kaj CE pasanta per C, do estas du centroj. Tio estas neeble. Kie kuŝas la eraro?

La cirklo kiu pasas per C, N, M pasas ankaŭ per I; la punktoj D kaj E ne plu ekzistas. Do unu sola diametro IC kaj nur unu centro.

La pilkoj :

Aritmetika solve. — Se oni pagas 20 centimojn malpli por ĉiu pilko, por 15 oni pagas : $20 \times 15 = 3,00$ frankojn malpli. Tiu sumo permesas aĉeti 5 pliajn pilkojn. Do ĉiu pilko kostas $3,00 : 5 = 0,60$ centimojn. La unua prezo estas do : $0,60 + 0,20 = 0,80$.

Algebra solve. — Estu « x » la unua prezo de unu pilko. La dua prezo estas $x - 0,20$.

$15x = 20 (x-0,20)$; $20x - 15x = 400$; $5x = 400$

Do $x = 80$.


NOVAJ PROBLEMOJ (S-ro Jarlier).

La miksaĵo : Cent litroj da iu vino kostas 150 frankojn. Cent litroj da alia vino kostas 135 frankojn. Laŭ kiuj proporcioj oni devas miksi la du vinojn por ke cent litroj da miksaĵo kostu 140 fr.

Kompletigu :

84 ...	8.
...	1 ... 9
34	
34.	
...	
...	
...	
...	
2	

GRAMATIKO PER BONHUMORO



— Oni ĉiam diras, ke edzo estas multe influata de sia edzino.



— Ĉu mi ne povis trovi pli logan edzon ?
Sciu, Maria, ke mi estas pli allogata de pasero en mia mano ol de kolombo sur la tegmento !




— Vi amas mian filinon ? Bone. Ĉu vi vidis mian edzinon ?

— Jes, sed mi estas pli allogata de via filino.

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (39 aŭst. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (70 fr.).
Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (10 ŝil.).
Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (1,50 us. dol.).
Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (10 kr.).
Finnlando : S-ino Kerttu Väättänen, Mäntyläntie 4, LAPPEENRANTA 5 (6,2 mk.).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33, - pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (5,6 mk.).
Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1º, la, BARCELONO (77 pes.).
Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (840 lir.).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1260 d.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (5 guld.).
Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg. 56, LAMBERTSEDER (10 kr.).
Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (50 zl.).
Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk. 157007 (8,4 kr.).
Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).
Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).
Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (1,50 dol.).
Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncintajn

Aktepas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plilerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo


Bulletin spécial

DE LA

5^e Semaine Culturelle Espérantiste

Semaine organisée sous le patronage du Ministère de la Jeunesse et des Sports
à la MAISON CULTURELLE DES ESPÉRANTISTES FRANÇAIS

Château de Grésillon — BAUGÉ (M.-&-L.)



LE CHATEAU DE GRÉSILLON

par Baugé (M.-&-L.)

cù se déroulent, tous les ans, la semaine culturelle
de Pâques et, de juin à septembre, des stages
et des rencontres internationales.

Pendant la conférence sur le Japon donnée par
une stagiaire japonaise : de gauche à droite : M.
Turin, directeur pédagogique du stage ; M. Marcel
Diouaba (République Centrafricaine) ; M. Boyet,
directeur de l'Ecole Normale d'Angers ; M. Rous-
seau, trésorier d'U.F.E. ; Mlle Sooko Horie (Ja-
pon) ; M. Llech-Walter, directeur culturel.



COMITÉ D'ORGANISATION

Direction Culturelle :

M. LLECH-WALTER, président de l'U.F.E., président de l'Association Polytechnique des Pyrénées-Orientales, professeur d'Espéranto au Lycée Arago de Perpignan et au C.E.C. d'Elne (Pyrénées-Orientales).

Direction Pédagogique :

M. et Mme TURIN, instituteurs.

Administration-Intendance :

M. BABIN, professeur d'Anglais et d'Espéranto au Lycée de Rochefort, président de la Maison Culturelle, et Mme BABIN.

M. JELENC, professeur de Sciences naturelles au Lycée de Châtellerauld, et Mme JELENC.

Mlle LETERME, secrétaire administrative de la Maison Culturelle Espérantiste.

LES CONFÉRENCIERS

M. Babin, président de la Maison Culturelle, professeur d'Anglais et d'Espéranto au Lycée de Rochefort.

M. Duc-Goninaz, professeur agrégé de russe, président de l'Institut Français d'Espéranto.

M. Guillaume, secrétaire général de l'U.F.E., délégué de la Fédération Française des Universités Populaires.

M. Martin, professeur agrégé d'anglais au Lycée Technique de Rennes.

M. Rousseau, trésorier de l'U.F.E., chroniqueur philatélique.

M. Tierry, membre de l'Institut Français d'Espéranto, rédacteur en chef de la Revue Française d'Espéranto.

LES PARTICIPANTS

Plus de 100, dont 80 stagiaires, élèves de cours d'Espéranto dans divers établissements scolaires et bénéficiant d'une bourse de séjour offerte par l'U.F.E.

Avec cette cinquième semaine culturelle, plus de 200 éducateurs d'Espéranto auront été formés. C'est un magnifique résultat dont l'Union Française pour l'Espéranto peut être fière.

Dans de nombreuses villes, ce sont d'an-

ciens stagiaires qui donnent de nouveaux cours d'Espéranto dans les établissements d'enseignement, conformément à la circulaire ministérielle du 11 octobre 1938 permettant l'enseignement de l'Espéranto au cours des activités dirigées.

✱

En outre, une dizaine de jeunes venus de 7 pays, de 4 continents : Danemark, Espagne, Irlande, Italie, Centre-Afrique, Uruguay, Japon, participèrent à cette manifestation.

Travaux et loisirs au cours de la semaine

Vendredi 1^{er} Avril :

ARRIVÉE DES STAGIAIRES. Réunion commune.
Règlement intérieur et programme d'activités.

Samedi 2 Avril :

- 9 heures : Etude d'un texte en Espéranto (M. Turin).
- 11 heures : Conversation et jeux en Espéranto (M. Motillon).
- 17 heures : M. Duc-Goninaz, professeur agrégé de russe : « Orthographe et phonétique en Espéranto ».
- 21 heures : M. Martin, professeur agrégé d'anglais : « Pourquoi un dolmen à Baugé ? ». (Renseignements sur les Celtes).

Dimanche 3 Avril :

Connaissance de l'Anjou, grâce à une excursion aux châteaux de la Loire, sous la conduite de Mme Cheverry : Baugé, Cunault (visite de l'église romane), Saumur, Bagneux (visite du dolmen), Montreuil-Bellay, Doué-la-Fontaine, Brissac.

- 21 heures : M. Guillaume : « La Scandinavie », conférence avec projections.

Lundi 4 Avril :

- 9 heures : Etude d'un texte en Espéranto (M. Turin).
- 11 heures : M. Thierry : « Car le mot est le Verbe ».
- 16 heures : Causerie d'une étudiante japonaise, Mlle Sooko Horie : « Le Japon » (avec projections).
- 17 heures : Lecture commentée d'une saynète : « Une femme à la frontière », de Mlle Boulton (M. Turin).
- 18 heures : Conversation et jeux (M. Motillon).
- 21 heures : « Le Moulin des Apprentis » (film).

Mardi 5 Avril :

- 9 heures : Etude d'un texte en Espéranto (M. Turin).
- 11 heures : Conversation et jeux (M. Motillon).
- 16 heures : Causerie sur « le laser » par un jeune italien : M. Gianpiero Rodari.
- 17 heures : Lecture commentée d'une pièce de théâtre (M. Turin).
- 21 heures : M. Babin, professeur d'anglais : « Education et Tolérance ».
- 22 heures : Projection du premier film en Espéranto : « Angoroj » (Angoisses).

Mercredi 6 Avril :

- 9 heures : Etude d'un texte en Espéranto (M. Turin).
- 11 heures : Conversation et jeux (M. Motillon).
- 16 heures : Causerie d'un jeune Danois, M. Ulrik Rasmussen : « Pays Scandinaves : Islande et Groenland ».
- 17 heures : Lecture commentée d'une pièce de théâtre (M. Turin).
- 21 heures : M. Rousseau : « Connaissez-vous l'Islande ? », conférence avec projections.

Jeudi 7 Avril :

- 9 heures : Etude d'un texte en Espéranto (M. Turin).
- 11 heures : Conversation et jeux (M. Motillon).
- 16 heures : Causerie d'un stagiaire catalan, M. Michel Lafont : « Roussillon, Pays de joie et de lumière ».
- 17 heures : Lecture commentée d'une pièce de théâtre (M. Turin).
- 21 heures : M. Rousseau : « Organisation de l'U.F.E. par rapport à l'U.E.A. (Association internationale) et aux Fédérations et groupes (Associations nationales)

Vendredi 8 Avril :

9 heures : Etude d'un texte en Espéranto (M. Turin),

11 heures : Conversation et jeux (M. Motillon).

16 heures : Lecture commentée d'une pièce de théâtre (M. Turin).

17 heures : Rapport de la semaine culturelle

21 heures : Soirée de variétés. Chant des Adieux.

Le contrôle du stage a été effectué par M. André Petit, Inspecteur du Ministère de la Jeunesse et des Sports.

Rapport des stagiaires

Tous les stagiaires s'accordent à dire que la Semaine Culturelle est un stade nécessaire pour se perfectionner dans la langue internationale, pour apprécier et pour préparer à leur tâche les futurs enseignants de l'Espéranto. Tous ont été enchantés de l'atmosphère amicale et joyeuse qui y régnait.

Nous avons pu faire des progrès en Espéranto grâce aux cours, aux conférences et aux autres activités. Nous avons étudié des textes en Espéranto, traduits ou originaux, d'auteurs tels que : Kalocsay, Schwartz, Grabowski, Edmond Privat. Ils nous ont permis d'approfondir nos connaissances grammaticales et de goûter la musicalité de la langue. Malgré la diversité des niveaux, tous ont pu profiter de ce stage ; certains suivaient des cours selon une méthode moderne directe, tandis que d'autres répétaient des saynètes.

Les conférences ont traité des thèmes les plus divers :

— Linguistique : « orthographe et phonétique » et « car le mot est le Verbe » ;

— Sciences : « le laser » ;

— Histoire : « Informations sur les Celtes grâce au dolmen de Baugé » ;

— Géographie : grâce aux projections, nous avons pu faire connaissance avec des pays très variés : Japon, Pays Scandinaves, Islande, Hongrie, Uruguay, Groenland ;

— Organisation du mouvement espérantiste ;

— Buts de l'Espéranto : « éducation et tolérance » (intercompréhension des peuples).

Nous avons fait aussi connaissance de l'Anjou par une très intéressante excursion préparée et commentée par Mme Cheverry, au cours de laquelle nous avons visité l'église de Cunault et

les châteaux de Montreuil-Bellay, Brissac et Angers avec ses remarquables tapisseries de l'Apocalypse. Mentionnons encore les promenades dans les environs immédiats : Baugé, la Pharmacie de l'Hôpital, la Vraie Croix, le Dolmen, et, aussi l'église de Pontigné.

Nous avons pu constater les nombreuses possibilités de la langue internationale grâce à une exposition de livres et à la projection du premier film en espéranto : « Angoroj » (Angoisses).

Pendant les moments de liberté qui nous étaient impartis, nous ne cessions de pratiquer la langue internationale ; les jeux étaient animés par le toujours jeune M. Motillon qui nous a montré que l'humour existait aussi en espéranto ; nous avons chanté, dansé ; les repas étaient aussi l'occasion d'appliquer la langue dans une atmosphère détendue.

Au cours de ce stage, huit nations, quatre continents étaient représentés : Danemark, Espagne, Irlande, Italie, Centre-Afrique, Japon, Uruguay, France.

C'est avec regret que nous avons quitté le château de Grésillon car nous avons passé une semaine enrichissante et, pour cela, nous tenons à remercier M. le Ministre de la Jeunesse et des Sports, M. Lech-Walter, président d'U.F.E., Mes sieurs et Mesdames Babin, Jelenc et Turin, ainsi que tous ceux qui ont participé à l'organisation de ce stage.

Un groupe de stagiaires.

Le gérant : GUILLAUME

Imp. Coconnier, Sablé (Sarthe)